

GRILKANTO

LA ARBO DIRIS:

— *Ili* povas plenumi
la dezirojn de infanoj.

Se dirite de arbo, nepre jen vero. Tion ĉiu infano scias.

La arbo diris sekve:

— Vi devas alvoki.

Ilin.

La afero ne malfacilas. Vi devas nur jen —
tamburi sur kruda ligno

la ritmon de tiu lulkanto unue aŭdita,
eltiri la unuan grizharon, kiun vi ekvidos
en la hartufo de kukolo,
ŝteli la lulilon de la unuenaskito
en la familio de enŝteliĝantoj ĉe vi,
trinki la unuan rosguton sur rozlipoj.

La knabino demandis:

— Kial ĉio devas esti ies unua?

La arbo respondis:

— Ĉar la unua estas la ununura grava.

La knabino tiam ploris — infaneco estis jam la dua en la vivo. Kaj ŝia memoro kiel bebo estis rosumita spegulo, kiu jaron post jaro iom pli malheliĝis por kovri la ŝiraĵojn de aĝo.

Ŝi revenis hejmen kun larmo-spuroj brilantaj survange.

Ŝia duonpatrino demandis:

— Kio okazis al vi?

La knabino volis rakonti la veron — jen ŝi ĵus malkovris, ke la plej grava en ŝia vivo estis perdiĝanta en la forgesnebulon. Sed tiuj ne estis aferoj kompreneblaj al adoltoj. Ili forgesis eĉ, ke jam ne pli restis por forgesado.

Ŝi tiam elektis rakonti duonveron, kio estas kvazaŭ vero vidita sub krepuska lumo:

— Mi perdiĝis en la arbaro. Tie estis terura arbo. Mi timis.

Kaj la duonpatrino kredis ŝin, kaj pro tio, ke ŝi kredis ŝin, ŝi ŝin punis. Tiun vesperon naskiĝis la mensogo — patrono de tiuj perditaj infanoj en la arbaro, kiuj eltrovas sekreton nerakonteban, eĉ ne duone.

Sed la arbo diris iom plu:
— Se vi ne petos deziron,
se vi rakontos al iu ajn ĉi tion,
ili venos al vi
por plenumi per via karno kaj viaj ostoj
siajn proprajn dezirojn.

Ne gravas kiom fore vi troviĝos —
niaj radikoj estas pli profundaj
kaj niaj branĉoj povas kapti
eĉ la spurojn de birdoflugo.

Vi ne povas fuĝi,
sed povas kaŝiĝi;
provi,
kvankam tio konsumos tutan vian vivon,
tutan ceteron de vivo, kiu restos al vi forgesinte
la unuajn aferojn.

Kaj vi forgesos ankaŭ ĉi tion,
kio estas la unua renkontiĝo kun la arbaro;
vi pensos, ke ĉio estis infanaĝa koŝmaro
aŭ efiko de la veneno,
kiun via duonpatrino miksis por vi kun la supo,
ĉiutage,
kaj vi lernos vivi kun tio
ĝis la tago, kiam vi ekkonos la unuan de la lasta:
morton.

Krom se vi
plenumos ĉiun taskon kaj
petos deziron.

Sed la knabino ne volis peti deziron.

Ĉio, kion ŝi memoris deziri dum sia vivo, estis notita en kajero. Ĉiufoje, kiam ŝi atingis unu el tiuj deziroj, ŝi forstrekis ĝin. Estis malsamaj sekcioj en la kajero kaj ĉiu el ili havis almenaŭ unu eniron. Ĉiuj estis tre simplaj deziroj, el tiuj atingeblaj per kuraĝo aŭ mono, tio estas, deziroj ne konantaj imagpovon: manĝi manplenojn da nuksoj, trinki pluvakvon, ekuzi la plej belan robon somere.

Deziro sen imagpovo naskiĝas por plenumiĝo. Deziro sen imagpovo ne estas vera deziro, kiu laŭdifine devas esti neplenumebla. Tion ĉiu infano scias, sed ili strebas provi forgesi.

Kaj la neebla povas fariĝi ebla, sed ve al la kompensa prezo! Manĝi manplenojn da nuksoj perturbas la stomakon, trinki pluvakvon toksas kaj kongestas, ekuzi la plej belan robon vekas enviojn kaj venĝojn. Oni povas postvivi ĉion tian. Sed la neebla ne ekzistas; por naskiĝi, ĝi devas malfermiĝi elde la matrico de morto.

Tion ne ĉiu infano scias, sed ŝi jes.

Ĉi-nokte, sub lumo de plenluno kaj de lampir-skadroj, ŝi malfermas sian kajeron je la lasta paĝo, la sekreta sekcio. Ŝia sola deziro estis skribita per ruĝa inko, nur por tio, ke en noktoj kiel ĉi tiu, ĝi brilu kiel sango:

Puni mian duonpatrinon tiel kiel ŝi meritas.

Tiu estas deziro plenumbla nek per kuraĝo nek per mono: ankaŭ tion ŝi scias. Kaj ŝia imagpovo estas tro limigita por rakonti al ŝi kiajn aliajn hororojn eble faris ŝia duonpatrino kaj tiel ekpensi vere taŭgan punon.

Ĝi estis deziro plenumbla nur de *ili*.

Por kio ekzistas arbaro se ne por tio? Por plenumi neebajn dezirojn kaj akiri la prezon, kiun la deziranto meritas.

Ha, sed do ŝi povus peti ion pli belan, pli teruran, pli urĝan: revenigi ŝian patrinon, la veran, el la regno de morto. Tamen, la knabino neniam eĉ ekpensis pri tiu eblo. Ŝi ĉiam opiniis tiun sojlon netrapesebla en la kontraŭan direkton, eĉ helpante sin per la plej malnovaj artifiko de la naturo. Iel, eĉ en ŝia kaŝejo el infana naiveco, ŝi lernis timi kaj respekti tiun limon. Tial, malgraŭ ke la foriro de ŝia patrino daŭre ŝajnas al ŝi antaŭtempa kaj maljusta, ŝi scias, ke ŝi ne devas provi turni ĝin. Cetere, kiel utilis starigi tian deziron, se ĉiuokaze ŝi mem kaj ĉiu alia konata vivulo iam trovus la saman destinton? Ŝi devus deziri do posedi la sojlo-ŝlosilon por malfermi kaj fermi laŭplaĉe, sed tio estus kvazaŭ deziri esti dio kaj tiu estas pli taŭge deziro de adolta virino kiel ŝia duonpatrino, ne de infano, kiu provis fari per sia propra homa febleco elmontron de rezistemo.

Kio gravas estas tio, ke ŝi ne volas deziri ion ajn. Ŝi ne volas pagi la prezon. Ŝi timas kaj malĝojas. Ŝi volas eliri el la arbaro, en kiun ŝia tuta vivo ĵus transformiĝis, sed la arbo diris al ŝi, ke nur morto povos ŝin elirigi.

Tiam ŝi ekpensas ion: se ŝi povis trompi sian duonpatrinon per duonvero, kial ne provi trompi la arbon per duonmensogo? Ŝi ne scias, ke arbo kaj duonpatrino estas du malsamaj estuloj, ĉar iliaj naturoj estas tro similaj: ambaŭ diras hororajn vortojn per hororaj voĉoj, ambaŭ havas terurajn longbrakojn kaj sufokajn denshararojn.

La arbo povus proponi al ŝi teleron da supo; ŝia duonpatrino — deziron. En ia maniero, ambaŭ tion faris. Ambaŭ estas malbenitaj, ambaŭ deziras malbonon al ŝi ĉirkaŭvolvante ĝin per la bela papero de falsaĵo por ke ŝi akceptu.

La knabino pensas buliĝinte en sia lito:

— Sed kiel malsimilas duonmensogo kaj duonvero?

Nokto knaras sub grilaj paŝoj. Jen la unua fojo, ke ŝi rimarkas ilian ĉeeston.

Se estos respondo, ĝi naskiĝos sub ilia kanto: tio jam estas sufiĉa konsolo. Eble ankaŭ ŝi devos lerni kanti. Eble ŝi lernis antaŭlonge, antaŭ ol ŝi ĉesis esti bebo, ĉar tio ŝajnas grava al ŝi. Kaj eble ŝi lernis kaj ŝia duonpatrino trenis ŝin en forgeson: krueleco estas posedaĵo de adoltoj, kiuj ne eltenas, ke infanoj ankoraŭ memoru gravajn aferojn.

Bati ŝian korpeton ĝis ruĝigo kaj transformi ŝian kanton en la sangon pulpon de krio estas io, kion ŝia duonpatrino povus fari, jes. Ne tre malfacilas imagi tion, do iom da vero devas troviĝi en tiu penso. Duonvero.

Kion la arbo ne diris al ŝi estas tio, ke perdita memoro povas esti retrovita: io en la grilkanto ekstere tion susuras. Io skuiĝas en ŝia koro tion pensante, ĉar ŝi scias, ke tio permesus al ŝi superi la arbaran kaptilon kaj eskapi de ties foliaro.

Ŝi volus komenci eskapante de sia ligna loĝejo, kiu memorigas ŝin pri la haŭto de la arbo, kvazaŭ ŝi jam estus enfermita en ĝiaj internaĵoj. Sed ŝi ne povas. La fenestro estas tro malgranda; ŝia duonpatrino mansonfermis ĝin por ke nur lunlumo povu iri tien-reen tra ĝia fendo. Cetere, la knabino scias, ke sencencas provi forfuĝi: la lumo falas sur la tutan teron kaj tie, kie ombroj ne permesas al ĝi trapasi, estas teritorio de la arbaro. Ŝi estas embarasata. Embarasata kaj malsana.

Kaj tamen ŝia duonpatrino kaj la arbaro forgesis la grilojn, kies kanto fendas la nokton kiel rando de ponardo.

La knabina koro sangas pro memoroj; ŝi estas grave vundita, venenita. Vivo elglitas el ŝi antaŭ ol ŝi povas rimarki. Sed, kiam finfine mallumo fermiĝas ene kaj ekster ŝiaj palpebroj, memoro vekigigas meze de ŝiaj okuloj.

Ŝi forgesis la grilojn, la duonpatrino — tio eblas, ŝi estas adolto. Sed forgesi ilian kanton estis fatala eraro, kiun ŝi neniam povos sufiĉe pripenti.

Ene, la senmova korpo de knabino kuŝas apenaŭ tenante kajeron el flaviĝintaj folioj. Tiu, kiu kuraĝus forpreni ĝin el ŝiaj manoj, rimarkus, ke iu deŝiris siaflanke la lastan paĝon, sed — kiu aŭdacus profani la sekreton de punita knabino kviete ripozanta en mondo pli fora ol ĉiu alia?

Tiuj, kiuj ne komprenas pri gravaj aferoj, kiel ŝia duonpatrino: frustrite de la senceco de la senutilaj infanaj fervoroj skribitaj per rondecaj literoj, ŝi decidas forĵeti la kajeron en fajron. Kion ŝi atendis trovi sur tiuj paĝoj? Ĉu prilaboritan planon por liberigi sin de ŝi? Ŝi estas nur infano. Infanoj planas nenion, ili bezonas adoltiĝi por ellerni plani. La duonpatrino tion scias ĉar ankaŭ ŝi estis foje infano, kvankam tio jam ne plu estas memorata de iu ajn nek gravas al iu ajn, eble eĉ ne al ŝi mem. Sed tiam, tuj post kiam ŝi forĵetis la kajeron en la flamojn, io ene de ŝi removiĝas. Io, kio ŝajnas melodio kaj idiomo enfermitaj en ŝia brusto. Io simila al kanto.

Sed ne! Ŝi devas forgesi ĝin. Kiam la eno de adolto removiĝas, tion kaŭzas malbonfarto aŭ malsano. Jes, tio estas; la kanto estas malsanaĵo, kiu komocias la korpon kaj sufokas la animon. Tial ŝi penis dehaki ĝin de sia vivo kaj forĵeti ĝiajn putrajn semojn fekundajn for de sia hejmo.

La tuta knabino estis kanto en ŝia adolta vivo, donaco veninta en la sama pakaĵo kune kun la varmaj brakumoj de ŝia edzo, kaj kiun ŝi ne atendis. Rozkolora knabino kiel aŭroro kaj rezerviĝema kiel nokto: tiu infano, kiun ŝi neniam povis koncipi. Sed ha!, nur malofte grandiozan donon oni scipovas taksi laŭ ties valoro kiam ĝi estas metita sur manojn, kiuj faris nenion por meriti ĝin. Kaj la ŝiaj, aldone, nur volis atingi la koron, kiun tiu viro simbole enterigis apud lia unua edzino. Nenion pli. Kiel gravus al ŝi uzi ilin por konsoli la ruĝiĝintajn vangojn de tiu etulino serĉanta en ŝiaj okuloj la perditan rigardon de la vera patrino?

Arboj ne bezonis ŝanĝi multfoje siajn vestojn antaŭ ol ŝi ekkomprenis, ke ŝi estas fremdulo en tiu familio amputita de la destino. Tempo lernigis al ŝi malami matenojn kaj vesperiĝojn, ĉar ili signis ekon kaj finon de tagoj, tagoj akumuligantaj en ŝia brusto kiel ŝimintaj ŝtonoj. La sola kreskaĵo sur ili estis marĝenita, abomeninda vivo. Kaj la knabino, kun ŝia rozkoloro kaj ŝia

rezerviĝemo, komencis konstante memoriĝi ŝin, ke suno kaj luno leviĝadis kaj subiradis indiferente pri la doloro kaj frustriĝo de tiuj rampantaj sub iliaj lumoj.

Indiferente al ŝi kaj al li.

Kvankam li ne rampis multe pli longe. La ruĝa kaj varma trenstrio naskita de lia memmortigo estis lia lasta testamento sur la mondo, sed ŝi ne kuraĝis sekvi lian ekzemplon — ŝi sciis, ke la viro decidis daŭrigi la vojaĝon en tiuj foraj teritorioj, kien malsano ekzilis lian unuan edzinon. Tiu rivereto, kiu apenaŭ plenigus malgrandan vazon, estis etega prezo pagenda kontraŭ la rerenkonto — bagatelaĵo. La cetero de liaj dumvivaj posedaĵoj — lia kuntirita korpo, lia vualita rigardo kaj lia sekiĝinta espero — estis antaŭlonge konsumiĝintaj en funebro.

Ŝi povus foriri la unua, sed la virino neniam havis iun, kiun alrenkonte serĉi, kaj ŝia sango ne estis sufiĉe ruĝa; ŝimo malheligis ĝin per malamo. Kaj nun, kiam li estis forpaŝinta, jam ne plu sencis, ke ankaŭ ŝi foriru. Ŝi devis fari venĝon. Ŝi devis silentigi eĉ la lastajn eĥojn de la kanto.

Sed malrapide: nek tago nek nokto montriĝis al la tero abrupte, nek voĉo povis rompiĝi kiel bovlo el friska porcelano forĵetita disde la monto de rabio. Unu bato je la vekiĝo, jes, kaj unu plia je la enlitiĝo, kompreneble. Melodio kaj deziro perdiĝu en la konfuzajn ondojn de ekkrio. Parolo mallarĝiĝu ĝis kiam ĝi povos esprimiĝi nur per la lingvo de doloro. La silento de la mortoj inundu ĉiun kavon de la domo kaj ĉiun angulon de iliaj koroj.

Tio pri venenita supo komenciĝis longe poste, kiam tiu silento fariĝis nesufiĉa. Ĉar la infana korpo, silenta kaj ankaŭ kuntirita, paroladis per sia propra okulta idiomo; ĝi eklernis per tiu nostalgio, kiun la perdo en ĝin plantis kiel semon. Tiu korpo memoris ion, kion ŝi neniam havis: familian amon. Kaj tiu memoro skuadis ĉiun colon de la domligno per sia kvieta strideco — pulsado, kiun nur ŝi povis senti brueganta, ĉar ŝi perdis sian propran koron en trudherbaro.

Kiel silentigi korpon?

Jen, ŝtopante per iu aĵo, iompostiome, ĝian internon. Aĵo obstrukcanta la glatan fluon de ruĝa sangopado, por ke ŝi neniam povu partopreni la vojaĝon, kiun entreprenis la gepatroj. Aĵo etega, kiel tranĉileto kaŝebla enmane kaj konfuzebila inter la varmeco de vivo kiel krifobato de lerte kamuflita sovaĝbesto.

Ŝi trairis eĉ la arbarajn internaĵojn serĉe de ĝi, ĝis kiam ŝia propra trenstrio, nigra kaj naŭza, allogis ilin.

Jen la rakonto pri tio, kiel la virino malkovris novan manieron kuiru supon.

Vi putrigas la arbaron

— ili avertis ŝin.

Vi estas malbenita

— ili akuzis ŝin.

Ŝi petis:

— Rigardu miajn manojn. Rigardu miajn manojn kaj la ruĝon, kiu deverŝas de ili.

— *Tiu ne estas via sango, ne estas via sango;*

vijaj vejnoj estas malhelaj tuneloj,

kiujn povas traflui nur galo,

kiel ŝvelinta kaj nigra limako

kiel malespero.

*Se estas ruĝo sur viaj manoj,
tio estas ĉar per ruĝo vi priverŝis ilin,
unue por haltigi ĝiajn kaskadojn
en la buŝo de via edzo
kaj poste por krevigi rojojn
en la buŝo de via duonfilino.
Tiu ne estas via sango, ne estas via sango
tiu per kiu vi priverŝas vin
por ŝajnigi senkulpecon.*

Tiel ili parolis, kaj la virino tremis antaŭ la vero kaj preskaŭ rompiĝis, disfendite. Sed ŝi venis tro foren sur sia vojo kaj devis daŭrigi antaŭen, aŭ ŝia propra naŭza trenstrio atingus ŝin kaj eldevigus la tributon, kiun ŝia ekzisto postulis dekomence.

Ŝi insistis:

— Rigardu miajn manojn kaj tiun ruĝon, kiu verŝiĝas el ili.

Ne senkulpecon mi serĉas, sed respondon.

Kiel silentigi la vivmelodion

kaj mutigi ties memorkanton?

Mi kunportis fremdan ruĝon kiel
pruvon de miaj angoroj
ĉar mia propra vivo silentiĝis en ĝia koloro
kaj mia memorkanto perdis sian idiomon
en ĝia velkinta torento.

Kaj *ili* ekkomprenis, ke ŝiaj ruĝigitaj manoj inde laboris por ellogi el ili sekreton, kiun nur malofte ili kunhavigis kun homoj. Kaj ĉar ĝi estis vigla kaj intensa ruĝo, naskiĝinta de iame puraj koroj kaj tiame markitaj de la vundo de malĝojo, ili akceptis ĝin kiel tributon interŝange por la dono. Sed, laŭ la ĝusta maniero, ili indikis serion da farenaĵoj, kiujn la virino devis plenumi por malvolvi tiun multekostan donacon kaj atingi ĝian ardan pulpon: tamburi sur bruligita ligno la ritmon de tiu lamentokanto dediĉita al ŝia edzo; ŝteli la lastan tufon, kiun kukolo elŝiris el la knabino; mortigi la plej maljunan enŝteliĝanton de la familio, kiu loĝas en ŝia hejmo; deŝiri kaj sekigi tiun rozon, kiu jam forgesis la kison de roso.

Kaj demandis la virino:

— Kial ĉio devas esti ies lasta?

Ĉar ĉio tio jam ne plu gravas

— ili respondis al ŝi.

Kaj ŝi ekkomprenis kaj akceptis la proponon. Ŝi profanis la tombon de sia edzo kaj bruligis la ŝtipojn de lia ĉerko, por ke la flamoj rememorigu al ŝi per siaj kraketantaj voĉoj la melodion de tiu lasta kanto, kiu stariĝis en la funebraĵo. Ŝi postkuris tra tuneloj de koŝmaroj la kukolon kaj, lerta ŝtelanto, ŝi fendis ĝian sakon kaj eltiradis la bulon da hararoj ĝis kiam ŝi trovis tiun ununuran haron orkoloran, kiun ŝi serĉadis. Ŝi kuŝis, mute kaj senmove, sur la malluma domo ĝis kiam ŝi sentis la paŝetojn de la enŝteliĝantoj, kiuj eliris ekskursi, kaj rompis la bruston de la plej maljuna el ili per forketo, kaŭzante histerion kaj doloron etegajn, sensignifajn kiel tragedio de agitita kolonio de

formikoj. Laste, ŝi falĉis per sola tranĉo la flavecan tigon de velkinta rozo kaj kunpremis ĝin inter la paĝoj forviŝitaj kaj vermoboritaj de vortaro pri formortintaj lingvoj.

Kiam ŝi finis, oni konsentis al ŝi unu deziron, nur unu. Kaj la virino bone profitis ĝin:

— Silentigi ŝin, tutan ŝin.

Obeante ŝian parolon, semo aperis en la nigra koro de tero kaj el ĝi, kiel morta malsano, elkreskis unu branĉo kaj poste alia, kaj alia kaj alia, ĝis kiam ĝi teksis lignotapiŝon pli malhelan ol nokto, peĉo kaj angoro. Sed ĝia foliaro... ha, ĝia foliaro! Ĝia foliaro kreis kroman arbaron, tian kie steloj restus kaptitaj kiel lampiroj sur araneaĵo.

Tie trovis kvietecon la koro de la virino, ĉar ĝi similis al ŝia propra animo, sed baldaŭ ŝi rememoris sian deziron kaj demandis sin pri la maniero en kiu tiu nova arbo perus al ŝi ĝian plenumon.

Tiam la arbo diris:

— Deŝiru pecon da mia ŝelo
same kiel vi deŝirus sanktan kruston
por malkaŝi sangan vundon
kaj pistu ĝin ĝis kiam vi transformos ĝin
en ion similan al nigra sukero
aŭ al intensa pipro
kaj disŝutu ĝian polvon sur bovlojn da supo
prezentotajn al la knabino,
kies silento vi tiel multekoste
postulis al la feoj.

Kaj ŝi tion faris, kaj ŝi daŭrigis ĝis la nokto en kiu la ununura sono aŭdebla ene de ŝia hejmo estis la susuro de la kajerfolioj malrapide glitiĝantaj sur la inertaj fingroj de ĝia posedanto. Eble ŝi jam perdis multajn vortojn, sed restis aliaj tenataj kiel trezoro inter tiuj folioj. Pri tiu kajero ŝi neniam eksciis, ĝis kiam ŝi finfine komprenis la kialon — ne perfidus arbo tion, kio devenis de ĝia naturo.

Tial ŝi impetis kontraŭ tiuj restaĵoj per tio, kio kapablas submeti kaj arbojn kaj kajerojn samnivele: fajro.

Kaj la kameno nun maĉmaĉadas la objekton, kvazaŭ ĝi estus viando plenplena de malmolaĵoj, kaj iasence ĝi estas. Sed ĝi voras malrapide, tro malrapide, kaj la volupta flamdanco iompostiome ravas ŝin kontraŭ ŝia volo.

Tiam ŝi rememoras la lastajn vortojn de la arbo:

— Mi naskiĝis nur por tio:
por kondamni tiun knabinon
kaj tamen ankaŭ por krei al ŝi ŝlosilon
per kiu liberigi ŝin de ŝia prizono.

Ŝi demandas sin nun:

— Ĉu eble la kajero?

Sed la kajero bruliĝas, aŭ tion ŝi volas vidi. Kajeroj ne estas ŝlosilformaj. Male, ili estas alia speco de karcerero, kie vortoj povas ŝirmi sin interŝanĝe por sia libereco.

Sed ne; ŝi scias, ke ĝi ne estas la kajero. Kiel kajero kaj arbo parenkas pere de tero, same fajro kaj arda koro de feoj parenkas pere de miro. Ĉiu deziro postulas ion interŝanĝe, ion krom la alvoko-

riton. Kaj ĉiu deziro, en ĝia senparola kontrakto, aldonas al si etan kaj nevideblan klaŭzon ŝlosilforme.

Kiam ŝi sukcesas distingi la murmuron de grilo disde la rumoro de flamoj, jam tro malfruas. Ŝi ekkuras en la ĉambron de la knabino, sed ŝi daŭre restas tie sinkiginte en la profundan sonĝon de tiuj, kiuj foriris tro frue, antaŭ ol pretigado de sia dusako. La kvieteco sur ŝia vizaĝo, kiu esprimas silenton malsaman al ĉiu, kiun la virino konis, perturbas ŝin dum sufiĉa tempo por ke la grilo elsaltu tra la fenestra fendeto, cele al sia nova libereco.

La insekto ne retrorigardas: ĝi jam povis hezite adiaŭi tion, kio ĝi foje estis. Ĝia fizionomio permesas al ĝi nek plori nek krei, nur kanti. Kaj al tio ĝi pretas, dum la kajero, anstataŭ cindre kuntiriĝi, kreskas-kreskadas en la kameno, trenante la fajrolangojn sur la avida ligno, kiu finfine ekkonas la kontakton de varmo.

La domo bruliĝas ĝis kiam ĝi fariĝas oranĝeca luno falinta sur la teron. Kaj la grilo eligas sian unuan kanton, tian kiu temas pri morto, pri vivo kaj pri kiel ili ambaŭ ŝajne internudiĝas ĉiam per la komenco kaj per la fino en brakumo, kiu konfuzas ekstremaĵojn kaj limojn. Ĝi estas tremanta kanto, kiel tro malforta branĉo subtenanta birdopezon — restas tro multe da homo ankoraŭ en ŝi. Vortoj, tiuj kiujn la mildaj volboj el karno artikulacias kaj kiujn grafitaĵoj desegnas sub la premo de manoj, fine senŝeliĝas en tiu lasta kanto, kiu estas samtempe la unua. La grila lingvo estas malsama, pli freŝa kaj melodia, kaj ĝia alfabeto ne facile lerneblas en nur unu nokto.

Bonŝance, ĉiu kiu envenis en la ekzistadon de ĉi tiuj estuloj tra oferpordo scias, ke nun ĝi havas la tutan tempon por lerni ree esprimi sin. Sed ĝi scias ankaŭ, ke en tiu spaco kie oni ankoraŭ ne komencas esti vera grilo nek finas esti vera homo, estas multaj aferoj por okupiĝi. Al la eta sensperta kantanto sufiĉas rimarki la rezinajn notojn en la nokta parfumo por rememori la solan nesolvitaĵon de sia antaŭa vivo: la nigran arbon. Ĝi volus pensi, ke kiel grilo ĝi sekuros kontraŭ la arabaj branĉoj kaj radikoj, sed la homa memoro neas, diras al ĝi, ke la arbo promesis postiri ajnan restaĵon de tiu knabino kaj ke ĝi eltrovos, ne gravas, kie ĝi provos kaŝiĝi. La grila spirito, dume, diras al ĝi, ke nun ĝi povos kontraŭstari la arbon ĉar ĝi jam ne plu estas elmetita al la minaco de deziro.

Tiu virino ricevis la punon, kiun ŝi meritis pro la detruo de tiu knabino, kiu ŝi estis, kaj per sia propra mano. Ĝia nova naturo diras al ĝi, ke nun nur mankas venki la nigran arbon, naskiĝintan el malamo kaj frustrigo de homa koro, por redoni al la mondo ĝian naturan kurson.

La grilo povus elekti venĝi sin per indiferenteco kaj forgeso por finfine komenci bonkanti la kanton, kiu al ĝi konformas. Ĝi povus. Ĝi povus, sed ĝi ne volas fari tion. Ĝi scias, ke tiu polveto ankoraŭ restanta el la knabino, kiu ĝi foje estis — rozkolora kaj rezerviĝema polveto, — baldaŭ perdiĝos en la noktaj ventegoj aŭ en la matena venteto. Eble ĝi eĉ elglitos el ŝi en iu estonta kanto. Estas malfacile pensi, ke la kurso de tuta ekzistado, enkapsuligita en faskon da jaroj, povas tiel malaperi; ke tiuj feliĉoj, timoj kaj malĝojoj, kiuj fosis tiel profunde en la karnon, foriras kun siaj spuroj kiel ŝarĝo al la landoj trans la konata mondo.

Sed tiel okazas, kaj sufiĉas esti malgranda insekto por kompreni tion.

Sufiĉas esti malgranda insekto, kapabla kanti melodion de giganto, por kompreni, ke pasinteco estas kanto, kiun oni ne devas forgesi. Kaj ne eblas ne forgesi ĝin, almenaŭ ne tute; ankaŭ tio veras. Neniu, nek grilo nek homo nek giganto, povus porti tian ŝarĝon da memoroj. El ili oni devas elekti kelkajn kaj, el tiuj, kelkajn trajtojn: unu rideton, unu grimacon de teruro, unu larmon. Aŭ eble ili elektas sin mem; neniu scias.

Kiel ajn, la grilo komprenas, ke la memoro destinita por konserviĝo en la nova memorkapablo estas tiu de redempto pri sia antaŭa homa vivo. La knabino, kiu estis devigita forlasi ĉion por iri serĉe de siaj gepatroj, bezonas konsolon kaj sencon por sia morto. Tio estas, ŝi bezonas historion,

ĉies definitivan sencon. Kaj en ĉiu historio inda je tia nomo, duonpatrinoj atingas sian finon meze de flamoj, kiuj konsumas la nigrecon ĝis atingi la blankan pulpon de infaneco, kaj la nigraj arboj tremigas sur siaj radikoj la pezon de siaj destinoj. Kaj eble ne en ĉiu historio estas nigraj arboj aŭ duonpatrinoj, sen en la ŝia jes kaj jen ĉio kio gravas. Ĉar ĉiu rakontata aŭ kantata historio el esperdeziro — la ununura, kiu postulas nenion malican interŝanĝe — estas la ununura, kiu ekzistas kaj entenas samtempe ĉiujn aliajn.

Tiel do ekiras la grilo inter herberoj kaj saltoj, preta elaĉeti la memoron de tiu knabino, kiu estas samtempe multaj knabinoj, ĉiuj mortintaj pere de la naŭza supo, la kruela duonpatrino aŭ la senhelpeco arbarmeze. Knabinoj, kiuj eble vagadas ĝuste nun ankaŭ kiel griloj aŭ kiel aliaj estuloj, aŭ kiuj eble vagadas nur kiel nigraj ombroj de eĉ pli nigra neekzisto. Por ĉiuj ili kaj por si mem, la grilo ekiras, ĉiu salto sur ĉiun herberon — noto sur la nokta partituro.

Ĝi ne aŭdas survoje ion ajn krom tion — ĝi decidis sigeli siajn orelojn al *iliaj* vortoj, kiuj falas sur ĝin kiel sufoka ŝtormo ne sukcesante forpreni de ĝi nek la deziron nek la urĝon daŭre antaŭeniri. Ili instigas al ĝi halti, turniĝi, kaŝi sian korpon en la vepro. Forgesi kaj komenci vivi por kreado de novaj memoroj. La plenumitajn dezirojn de feoj oni ne povas malrealigi, nur detru, kaj oni neniam rakontis ajnan historion en kiu grilo detruas arbon naskiĝintan de la nigra puto de virino vundita de rankoro.

Neutilas, neutilas.

— kantas la feoj, kaj du gutoj da neebleco kaptas la grilon dum kelka tempo.

Pli bonas peti al ni deziron.

Tiun deziron, el kiu vi preferis fuĝi.

La ŝlosilo, kiun vi forlasis sur la tablo

por ke ĝi fandiĝu pro la flamoj —

petu al ni, ke ni ree forĝu ĝin,

etan kaj leĝeran,

por ke nun vi povu malfermi per ĝi

pordojn, pri kies ekzisto vi neniam pensis

nek pri tio, ke ili povus konduki vin al via vera savo.

Sed la grilo fortrinkas la gutojn kaj liberiĝas denove. La vortoj de la feoj estas nenio por ĝi, nun kiam ĝi estas estulo naskiĝinta por flugo kaj kanto. Nenio estas ankaŭ la promeso pri ŝlosiloj, ĉar griloj ne komprenas pri pordoj; iliaj propraj melodioj trapasas ĉion: lignon, metalon, korojn.

Peti deziron al tiuj, kiuj tiom multe damaĝis ĝian pasintan ekziston, eĉ se nerekte kaj senpartie, estas io, kion nur homo povus fari, kaj ĝi jam ne plu estas homo.

Cetere, kiu povus esti tiu deziro? Ĉu io alia dezirindas por grilo se tio ne rilatas al ĝia kanto? Kaj ĉu eblas, estante grilo, deziri ion por ĝia kanto, kiun ĝi ne jam posedas?

Ne. Se ion kunhavas la nuna grilo kun la hieraŭa knabino, tio estas ilia disdegno pri deziroj realigitaj kontraŭ tre altaj prezoj. Oni devas malfidi feojn, kiuj ĉiam, per la favoroj konsentitaj de ili, lasas fendon tra kiu tragliti ilian ruinigon; tio amuzas ilin. Sed la grilo ne sentas rankoron al ili, ĉar ili foras de la homaj emocioj.

Ankaŭ grilo ne havas spacon en sia koro por tiaj aferoj malsimplaj kaj samtempe rompiĝemaj, sed same kiel ĉiu renaskiĝinto ĉe intermonda limo, io en ĝia renoviĝinta instinkto kuraĝigas daŭrigi al la nekonateco, eĉ kiam tio minacus ĝian novan vivon.

La grilo ne timas — ĝi havas urĝon de kanto. La obstineco de ĝia antaŭeniĝo estas tia, ke la feoj ĉesas pluvi sur ĝin kaj decidis ludi sian propran muzikon por ke ĝi estu vestiblo de ĝia renkontiĝo kun la arbo. Ili jam forgesis sian konversacion kun la virino, kiu venis al ili kun manoj trempitaj en fremda sango kaj la semon, kiun ili liveris al ŝi, ankaŭ tiun kaptitan knabinon, kies destino iam tiom multe allogis ilin. Nun ili nur interesiĝas pri tiu grilo, kiu, salton post salto, konturadas la nokton kiel skizon de konfrontiĝo.

Oni neniam rakontis historion, kie grilo venkas, ŝajne diradas ĉi tiu grilo per ĉiu salto, sed mi rakontos la unuan, eĉ se ĝi estos ankaŭ mia lasta rakonto.

Feoj adoras aferojn, kiuj okazas kaj por la unua fojo kaj por la lasta.

La nigra arbo aperas subite en la arbara densejo, preskaŭ kunfandita kun la nokto se ne pro tiu vento, kiu balancadas ĝian hararon, eniato de la kalva plenluno. Malsimile al feoj, kapricaj kaj nekonstantaj estuloj, ĝi naskiĝis fiksita al siaj du hejmoj: la rigida koro de la virino kaj tiu fendita tero, kie nur tordiĝintaj aĵoj povas kreski. Ĝi perdis la unuan, sed same kiel ĉiu detruita hejmo, ion ĝi sukcesis forporti kun si: memorojn pri malamo. Per ili ĝi rekonas en la grilo, kiu senmove observas ĝin, la knabinon, kiu foje ankaŭ montriĝis antaŭ ĝi, sed kiom malsimile al ĝia nova ekzisto! Ĝi ne demandas sin kiel tiu postvivis malgraŭ la veneno de sia patrino kaj la deziro, kiun ŝi rifuzis depostuli, eĉ ne kial ŝi je la fino fariĝis grilo; al ĝi nur gravas kompreni tion kio igis ĝin stariĝi tia nun, tiel spiteme.

La arbo removeas siajn memorojn serĉe de io helpa al kompreno, sed inter la faldoj de malamo ĝi nur trovas timon.

Kaj tiam ĝi diras:

— Reiru al via nokto, eta grilo.

Ĝia voĉo estas raŭka rumoro, kiu ŝajnas ŝpruci el ĝiaj radikoj, la branĉoj krakante kliniĝas super la grilo.

Sed la grilo lasas la arbajn vortojn gliti sur ĝi; kvankam tiel malhelaj kaj densaj kiel peĉo, ili estas faritaj el la sama materio kiel la feaj. Ĝi ne povas fortrinki ilin, sed tio ne estas necesa — tiel pezaj malbenoj kiel tiu estas destinitaj por herooj, ne por eta grilo okupanta nur malgrandan mondopecon, eĉ kunportante la enorman trunkitan vivon de senkulpa knabino.

Malamo timas esperon same kiel nokto mateniĝon, sed ambaŭ kutimas forgesi la ekziston de steloj — malgrandaj lumiloj, kiuj bezonas mallumon por ekbrili kaj kiuj en sia splendo entenas promeson pri matenruĝo.

Estas kurioze, ke la nokto plenas tiel multe de griloj kiel de steloj; eble ĉiuj apartenas al sama sekreta konstelacio.

La nigra arbo, kompreneble, ne povas scii tion. Ĝia foliaro estas tiel densa, ke ĝi sufokas eĉ la rosan scintilon, la feblajn arbo-stelojn. Ĝi konis nek faciliĝon de homa koro elpelinta noktajn koŝmarojn dum tagiĝo, nek serenecon de grila koro ricevanta la unuajn ombrojn de nokto kvazaŭ elstaran spektantaron por ĝia koncerto.

Kiel ĝi povus koni ĉion tion? La virino, kiu naskis ĝin, transformis la koŝmarojn en lulkanton, kiun ŝi povis aŭdi nur maldorme, kaj griloj neniam estis laŭ ŝi krom nostalgia simfonio, kiun ŝi dum tiom multe da noktoj provis dronigi en la kamenaj flamoj.

La jam ne plu ekzistanta knabino eklernis regi siajn timojn vekigante meze de mallumo; la grilo havos sian tutan vivon, etegan kaj kunpremitan kiel insekta vivo, por ellerni kanti neatendante ajnan spektantaron.

La nokto de la nigra arbo ne estis minaco, sed memorigaĵo pri tio, ke en la plej danĝera ofte kaŝiĝas ankaŭ la malkovro de mirindeco, same kiel en la feoj mem.

Sed la grilo jam forgesis ilian atentan ĉeeston malantaŭ si, aŭ eble tio ne interesas ĝin. Estas kanto stara en ĝia gorĝo, kiu estas samtempe la kanto de tuta gento, kiu ne tiel multe rilatas al ĝia nova naturo ol al tiu, kiun ĝi povis konservi nur en memoro kaj en ĝia heredaĵo: la gento de tiuj homoj, kiuj iam domaĝe perdiĝis en aliaj arbaroj kaj renkontis aliajn nigrajn arbojn, naskiĝintaj de la malamo de aliaj duonpatrinoj.

Ĝi ne konas iliajn nomojn nek en kiujn estulojn ili estis transformiĝintaj, aŭ pro beno aŭ pro malbeno, sed la magiaj spuroj devus esti similaj kaj je ili ĝi fidas.

La unua voĉo estas obtuza, kiel la unuaj ŝprucoj de roĵo delonge stagna, kiu devus lasi elflui ĉiun akumulitan malpuraĵon dum tiu tempo de senmoveco kaj silento.

Malfacilas voki iun, kies nomon oni ne konas, tial oni devas serĉi alternativojn: kromnomon, geston, lingvon nedependantan de ajna simbolo. Sed la memoro venas per si mem, kvazaŭ la nomoj finfine strebus veni al la grilo. Kaj ili venas el la historioj, kiujn feoj rimarkas dancantaj aere kaj enkanaligas al la eta insekto, kiu volas kanti per la voĉo de malnova kaj forgesita fabellibro. Se konsideri ĉion, ne ekzistas nomo kiu ne estas historio.

La dua voĉo estas tersimila, ĉar nun la roĵo kuntrenas la feblan sedimenton de pado, kiu malnoviĝis sen ĝi. Ŝtonoj, branĉoj, ostaroj de mortintaj bestoj — ĉio fariĝas polvo en ĝia reviviĝinta akvo-fluo, kaj per ĝi vojaĝas la eta kurso al liberigo de forgeso.

Samkiel la roĵo, la grilo sentiĝas devigita daŭrigi sian kanton malgraŭ ĝia pezo kaj denseco, ĉar historioj devas filtriĝi de ĉio fremda, per kiu la tempo ŝarĝis ĝin: reskribadoj, reinterpretadoj, neenmetoj, falsiĝoj. Historioj devas resti nudaj kaj poluritaj, kvazaŭ ĉiu vorto donanta ilian formon estus tuj eldirota en tiu momento.

La tria voĉo estas diafana — la roĵo rehavigis al si la viklecon kaj la purecon de ĝia fluejo kaj nun fluas same kiel ĉiu bonrakontita historio.

La grilo kantas-kantadas kaj en ĝia kanto la ĵus eltrovitaj nomoj fariĝas alvokoj. Al tiu alvokado prezentiĝas tiam hordoj da bestoj, insektoj kaj birdoj, dumlonge dormintaj en siaj novaj naturoj; la historioj, ankaŭ roĵoj, revigligis la memoron. Ili rememoras subite tiujn homajn vivojn tiel mallongajn kaj fragilajn, kiujn ili havis, kelke da ĝojoj kaj tristoj kaj mirindaĵoj, detruitaj per koro, kiu foje batis same kiel la iliaj.

Ankaŭ tiuj duonpatrinoj, kiuj ne ĉiam estis virinoj, ne plu ekzistas — malico de persono ankoraŭ estas homa malico kaj tial rompiĝema. La kreitaĵoj ne havas iun al kiu turniĝi por depostuli la perditan aŭ al kiu direkti siajn proprajn malbenojn, kiel kutimas okazi. Ofte moketo, fiasketo aŭ timeto estas nuraj semoj de enormaj arboj, el kiuj ĉiu establas siajn radikojn ĝis disŝiro de la koro de ĝia portanto. Kaj ĝiaj fruktoj, banitaj en larmoj el rabio kaj doloro, fariĝas nutraĵo de senkulpaĵ kaj sensciaj estuloj pri sia naturo, transformante tiel iliajn kernojn en novajn semojn, kiuj ripetos la ciklon.

La detruo de la nigra arbo ne interrompos ĝin, tio estas konata. Sed ĝi montros al ĉiuj tiuj kaptitoj preter ties bestaj formoj, ke semo povas esti mortigita kaj ke liberiĝo estas eblo.

Jen la lasta noto en la grila kanto — inspira diskurso pri kuraĝo por depostuli reen la rajtojn al espero kaj al elaĉeto.

Ili liberas! Liberaj je doloro, je renkoro kaj je malespero! Liberaj je la spuroj, kiujn fremdaj doloro, renkoro kaj malespero stampis sur vi ĉiuj!

Liberaj por decidi ĉu vi preferas reteni la senfinan tristecon de la perdita homa memoro aŭ ĉu vi elektas rezigni ĝin kaj vivi kiel nehomoj kun siaj propraj sovaĝaj memoroj kiel ŝarĝo.

Ĝi estas terura decido, sed ĉu ajna ne estas? Tiuj, kiuj ne estis volonte elektitaj kaj kiujn prenis sur sin la destino mem, samkiel la savo de knabino en grilformo, nur pezas pro ĝiaj efikoj. Sed tiuj, kiujn oni elektis memvole havas aldonan pezon — pro rimorso aŭ pro la demando pri kio okazus se oni preferus la formetitan opcion.

Fininte la kanton, la grilo scias, ke kaj ĝia ekzisto kaj tiu de ĝiaj samtragediuloj troviĝas meze de ambaŭ ebloj — destino decidis ilianome por gardi ilin de la homa malamo, kiu mallumigis ilian pasintecon, sed nun ili devas decidi por liberigi sian estontecon. Neniu opcio estas vere malbona, kaj tio nur malplibonigas aferojn.

Fininte la kanton, la grilo jam decidis. Lacega sed kontenta, ĝi lasas la eĥojn de sia voĉo lumigi la ceteron de la nokto kaj gvidi la vojon de la kreitaĵoj al la nigra arbo. Tiu jam ne plu havas dirindajn vortojn; ĉiuj estis eldirataj de la grilkanto, en historioj rakontitaj ree kaj ree milfoje kaj kiuj nur nun, sub ĝia foliaro, finfine ekkonos sian elnodiĝon.

La unua kiu proksimiĝas estas la cigno, foje la plej juna el sep gefratoj de jam forgesita reglando. Ĝi estas tiel blanka, ke ĝia pureco vundas la mallumon, kvazaŭ iu enigus akrapintan vergon inter ĝiajn nervojn. La arbo ektemas komprenante, ke la cigno decidis same kiel la grilo; tiu pureco fontas ankaŭ el interrompita infaneco kaj el la pura amo, kiun ĝi ĉiam sentis, eĉ kiel birdo, al sia fratino. Al ĝi kuniĝas iompostiome aliaj bestoj: urso kun dika felo, rano kun okuloj similaj al frakasitaj gemoj, cervo kies ramuro desegnas mapon de subakvigita lando.

Kelkaj elektis rememori, sed ne ĉiuj, nek la plimulto. Ili ne estas pli kuraĝaj tial, sed io rimarkeblas en iliaj rigardoj nun flamiĝintaj, kiu pensigas, ke nenio estas pli bela ol sovaĝa estulo lumigita de la spirito de homa memoro. La aliaj, kiuj rezignis, rigardas male disde la intenseco de la mistero de ilia akceptita naturo. En iliaj pupiloj pulsas la memoroj de ĉiuj iliaj antaŭuloj en batalado por aventuro kaj supervivo, kaj tio havas sian propran belecon, kvankam ĝi estas tia, ke ĝi neniam povos esti vere portretita nek de viroj nek de virinoj.

Neniu, eĉ ne la feoj, mutaj atestantoj, rimarkas kiu estas la unua ekagi. Sed tiam, post kelkaj momentoj, evidentiĝas kio farendas kaj neniu demandas ion ajn.

La arbo ellasas vekriegon kaj el ĝia ŝelo ekŝprucas fluetoj da glueca rezino.

La bestoj estas formanĝantaj ĝin.

Kelkaj, la plej malgrandaj, facilmovaj aŭ flugkapablaj, eskaladas, grimpas aŭ superflugas ĝian baldakenon kaj mordetas la plej malfortajn foliojn kaj branĉojn. La arbo komencas kalviĝi, sulkiĝante kaj ŝrumpiĝante pli kaj pli, kvazaŭ granda parto da ĝia forto fontus el tiu hararo per kiu ĝi kredis enfermi la nokton. Luno kaj steloj, antaŭe kaptitaj en ĝia impliko, finfine povas spiri kaj montriĝi super tiu terpeco ĝis tiam malpermesita.

La plej grandaj kaj solenaj bestoj sentas la kareson de tiu malvarma lumo kaj nova furiozo tremigas ilin. Iliaj malgrandaj kunuloj, jam disŝirinte la pinton, daŭrigas per remaĉado de la plej dikaj branĉoj; ili kuniĝas al ili atakante per hufoj, krifoj, kojnodentoj aŭ kornaroj la arboŝelon ĝis dispecigo malrapida kaj doloriga. Tiuj tranĉaĵoj el ebono, foje belaj kaj teruraj kaj nur ceditaj por la plej rafinitaj formoj de krueleco, nun kuŝas kiel rezinmakulitaj restaĵoj, kiuj krakas en la sangokovritaj muzeloj de la kreitaĵoj.

Neniu demandas sin kial estas tio kion ili devas fari. Ne ŝajnas senci — engluti la malicon mem, tiel enradikiĝintan kaj ĉiaman kiel miljaraĝa arbo. Tiu malico, kiu eligis tiom multe da larmoj, krioj kaj malesperoj kaj el kiu oni tiom multe provis forfuĝi antaŭe, dum tiu alia ekzistado. Tiu malico kiu eĉ nun, en la bestoj kiuj decidis forgesi, ĵetas ombron kiu estas pli memoro pri ombro, neekzistanta mallumo kiu, tamen, vualas ĉion ĉirkaŭe.

Ne ŝajnas senci, sed jen sencas. Kaj la grilo tion memoras kiam, revigliĝinte, ĝi ĵetas sin saltante sur la pulsantajn forĵetaĵojn de la nigra arbo, tie kie ĝia koro ankoraŭ batas. La kreitaĵoj

detruis jam ĉion, sed ili scias, ke ĉi tiu parto apartenas al ĝi kaj lasis ĝin tie por ke ĝi alproprigu ĝin al si. Ĝia etega makzelo deŝiras tiam la histon kaj trinkas ĝian sangon kiel malbongustaĉan eliksiron, sed necesan por kuraci malnovan kaj mortan malsanon.

Tion memoras la grilo: necesas reintegri tiun elfenditan malicon el si mem, anstataŭ fuĝi el ĝi kredante sin tute senkulpa viktimo. Tiu lasta paĝo de la forbruligita kajero ankoraŭ persistas kiel cindro, kiu eble povus transformiĝi en kompoŝton por aliaj arboj. La grilo ne forgesis tion, kio kuŝas skribite sur ĝi: ŝia deziro pri venĝo al la virino, kiu iam estis ŝia duonpatrino. Tio, ke ŝi jam ne plu ekzistas, ne gravas, ĉar ne estis tiu knabino, kiu sukcesis malekzistigi ŝin. Ŝia rifuzo al la fea tento ekestis pli kiel timo ol kiel persona decido; ĝi ĉiam sciis tion kaj nun akceptas.

Nun, mordon post mordo, ĝi intencas elaĉeti la knabinon kaj la virinon. Ambaŭ, kompatindaj homoj, donis sin al la freneza flukuado de emocioj, al la ĉeneroj de malamo kiuj konfuzas komencon kun fino. Estas io de la fatala konfuziĝo de la knabino en la rezina amareco: *kial mia patro provis enigi la formojn de ĉi tiu virino en la robojn de mia patrino, kial mi devas devigi min vidi en ŝiaj fremdaj trajtoj mapon de tiu amata vizaĝo, kies vojojn mi ne plu povas laŭveturi.*

Sed la grilo akceptas sian kulpon kaj poste pardonas ĝin — la doloro de funebro korodas kaj transformigas ĉiun novan ŝancon en ombron de jam perdita lumo.

Nun ĝi turniĝas al la gelatena strukturo de la koro, strukturo naskita de la virino, kiu ekzorcis ĝin el la malespero de sia rankoro. Kiom malfacilas al ĝi eniri en ĉi tiun novan rivelon! Sed ĝi jam ne plu portas homan esencon kaj ne apartenas al ĝi eldiri sentencojn pri moralo, eĉ ne al tiu tiel fatala por ĝia pasinteco. Anstataŭe, ĝi dediĉas sin al asimilado de ŝia frustriĝo kiel seksmatura kaj virga virino alligita al tiu, kiu jam estis revenanta el la amvojtoj: *kial li ne povas akcepti, ke ŝi foriris kaj ke mi estas nun ĉe lia flanko, kial li insistas riproĉi al mi la frukton de liaj plej feliĉaj tagoj kiel emblemon de mia fiasko.*

La rabio retenata en la nigra koro komencas malmoliĝi en la buŝo, kaj post ĉiu krako ŝi kredas distingi neniam viditajn scenojn, sed strange konatajn: jen junulino dompuriganta, kuiranta, flikanta vestaĵojn, teksanta. Junulino enfermita en ligna karcero, sed devigita moviĝi tra ĝia interno kvazaŭ la spaco de ŝia kaptiteco estus la plej granda arbaro. Eble simila destino atendus tiun knabinon se ŝi atingus tiun aĝon, kiam la inaj formoj ĉizas sin kontraŭ sanga prezo.

Eble ili ambaŭ neniam troviĝis tiel malproksime unu de la alia kiel ili tiom multe strebis kredi. Eble tiu virino estis knabino kiel ŝi, febla kaj timema de sia propra ombro vidante ĝin fandiĝi kun la arbaj, kvazaŭ ili volus riveli ŝian forneatan monstrecon. Kaj eble la knabino fariĝus virino kiel ŝi, kun cikatroj kaj bluaĵoj surface kaj mutigita voĉo, enfermita en malĝojo pri la scio, ke la etaj feliĉoj kaj belaĵoj de la mondo estas malpermesataj al ŝi.

Aŭ eble ne. La grilo scias, ke ĝi havas la povon penetri en la sekretajn faldojn de la pasinteco de tiu virino kaj konstati, sed ĝi decidas ne fari tion. Ĝi povus vidi la infanecon de la duonpatrino, sed ne adoltecon de la etulino — oni povas reakiri la enskribojn de pasinteco, sed ne la spiron per kiu ankoraŭ ne formiĝas la voĉoj de la estonteco. Kaj se nek la duonpatrino nek la knabino plu ekzistas, por kio daŭre insisti? Ĝi preferas konservi la eblon kaj tiun proksimecon, kiun la ina naturo iel-tiel etendis inter ambaŭ.

Jen, farite: ĝi pardonis ilin kaj nun lasas ilin liberaj. La grilo mem, en ĝia lasta decido, pardonis sin kaj liberigis sin mem.

Ĉio kvietas en la arbaro kiam finfine malaperis la nigra koro de la tero. Ankaŭ la bestoj foriris, serĉe de aventuroj. Kelkaj travivos ilin per la sovaĝa sevo de la vivo, en la eterneco de la novaj ekzempleroj de sia raso, ĉiam identaj kaj perfektaj al siaj prapatroj; aliaj, en la vaporanta kaldrono de historioj, kiujn homoj komencos removi per siaj vortoj, la rakontoj, ĉiufoje malpli mallertaj, pri fabelaj bestioj, kiuj timigas kaj blindumas per la sama intenso.

La grilo konsideras sin apartenanta al tiu lasta tradicio, sed nun ke ĝi ankaŭ liberas deziri sendanĝere, ĝi sentas, ke ĝia koro plenpleniĝas per malsama aspiro: espero. Ĝia kanto, ankoraŭ juna, kreis tro multe da melodioj ĉi-nokte, sed neniu sukcesis malhelpi la tragediojn, kiujn la vivo destinas por la elektitoj. Ĝia muziko estis elaĉeto, sed ne konsolo, kaj tio plenigas ĝin per tre dolĉa malĝojo, ĉar ĝi estas vakuo, kiun nur ĝi povos pleni.

La feoj, ankaŭ ili forirontaj al siaj malicaj aferoj, flustras al ĝi, ke ĝia tasko estas finita, ke ĝi liberigis ĉiun kondamniton, kiu ekzistis en la monda tradicio. La grilo akceptas, ke ili pravas, sed samtempe komprenas, ke tie kie homoj estas, estos boneco kaj malico, la varpo per kiu vortoj tekas historiojn. La kvoto estas purigita nuntempe, sed iam denove naskiĝos knabino, kiu kreskos kun rigardo ombrigita de enfermado, kaj tiu virino en kiun ŝi transformiĝos ree turmentos alian knabinon kun okuloj ankoraŭ lumplenaj de graco, kaj tiel porĉiame.

Tamen nun ĝi ekzistas, klarigas la grilo al la feoj kiel adiaŭon, antaŭ ol perdiĝi en la alta paŝtejo, kiu kondukas al nekonataj celoj.

Sed la feoj sekvas ĝin — ili ekkomprenis, ke finfine naskiĝis voĉo kapabla unuigi en unu sola rakonto la venontajn historiojn, kiujn la mondo rakontos pri knabinoj kaj duonpatrinoj.

La etulino mispaŝas. La sitelo, ĉiam peza, fariĝis roko en ŝiaj manoj post ŝarĝi ĝin per la valora porcio da akvo, kiun oni permesas al ili ĉerpi el la puto. Dum ŝia falo, la likvo elverŝiĝas kvazaŭ nana kaj nedaŭra rivereto, kaj devojiĝas sian fluon inter la ŝtonetoj kaj la herberoj survoje.

Ŝi estas febla kaj malsaniĝema; ŝiaj brakoj havas apenaŭ sufiĉan forton por pluki florojn, kaj jen io kion ŝi neniam farus ĉar ŝi amas kaj respektas aliulajn vivojn. Ŝia plejaĝa duonfratino, tamen, estas sana kaj tre forta. Ŝiaj vangoj estas ĉiam rozkoloraj pro ŝiaj aventuroj kaj ŝia sukkena hararo miele brilegas sub la somera sunlumo. Ŝi estas tre bela knabino, sed kruela kaj mokema. Ŝi amuziĝas ĵetante ŝtonojn al birdoj, ĉar tio timigas ilin kaj ekigas ilian ekflugon en malkvieto, kiu ĉiam postlasas faskon da plumoj. Ankaŭ kolektante pecojn de la disŝiritaj koroj, kiujn ŝiaj amindumantoj lasas al ŝi kiel ampruvon, nur ĉar per ili ŝi povas fari kolierojn kaj ringojn per kiuj allogi pli da knaboj, junuloj kaj viroj, kiujn ŝi neniam amos.

Tamen, ŝia duonpatrino neniam parolas bruske al ŝi. La etulino scias, ke ŝi estas ŝia preferata filino ĉar, nu, verdire ŝi estas ŝia ununura filino. Aldone, ŝi estas tiel bela, ke malfacilas kredi, ke sub ŝia sublima ĉarmo kaŝiĝas enkarniĝinta malico. Ĉu ne ĉiam la belaj junulinoj estas tiuj, kiuj sukcesis edziniĝi al la plej riĉaj princoj kaj akiri ĉiun bonaĵon de la ekzisto? Jes, jen kion historioj rakontadis. Entrudiĝantaj fremduloj kiel ŝi mem ĉiam estis malbelaj kaj mizeraj, katenitaj al vivo da servado, tede kaj suferado, kiu neniam estus parto de fabelo.

Ha, sed la etulino havas teneran kaj noblan koron, kaj ŝi luktas ĉiutage por ne malvirtigi ĝin en la rankora tajdo. Ĉiufoje, kiam ŝia duonpatrino ĵetas ŝin frumatene en la kamparon por ke ŝi iru preni akvon de la najbara puto, ŝi pensas pri la ĝojo forlasi dum kelka tempo la ĉelon de ŝia kabano kaj la tiranecon de ŝia duonfratino, kiu devigas ŝin fari ŝiajn juvelojn kaj robojn de sunleviĝo ĝis sunsubiro. Tiam, dum ŝi ŝarĝas la enorman kaj pezan sitelon, ŝi fantazias, ke ŝi ŝarĝas kofron, kie konserviĝas la trezoro de feliĉa destino, kiu troviĝas nur en ŝia imago.

La etulino scias, ke distriĝado estas malpermesata al ŝi, sed ŝia vojaĝo estas malrapida kaj peniga pro ŝia malforteco, kio igas ŝin kontempli kaj senti ĉiuokaze la ĉirkaŭan pejzaĝon: la tikladon de la altaj paŝtejoj herboj, kiuj dancadas je la melodio de la sekreta vento-muziko, la varmecon kiu varmetigas per oraj kisoj la surfacon de la mondo kaj la mutan protektadon de la arboj, kiuj orientigas ŝiajn paŝojn per sia senmoveco.

Tiu povus esti unu plia tago da mirado, sed ŝi ruinigis ĝin. Ŝi multe malfruiĝos reveni ankoraŭfoje al la puto kaj plenigi denove sian sitelon, kaj ŝia duonpatrino plej eble jam survojas, kiel kutime, por kontroli la senfuŝan plenumadon de ŝia tasko.

La etulino ekploras senkonsole, ĉar la manoj de tiu virino estas teruraj; tion scias ĉiu angulo de ŝia haŭto antaŭe ricevinta ŝiajn batojn. Sed kion ŝi povus fari? Ŝi estas sola, malbela kaj febla, kaj neniu amas ŝin.

Diste ŝi kredas jam distingi la malhelan kaj altan figuron de ŝia duonpatrino, kiel nigran arbon, kiu sukcesis eltiri siajn radikojn el la tero por persekuti ŝin. La vidaĵo teruras ŝin kaj ŝi sentas la emon provi forkuri ĝis kiam ĝi rimarkas, ke la impresio estis falsa. Sed ŝi ne havas tempon timi siajn reagojn, ĉar tiam ŝi ekaŭdas melodion, kiu neniel similas al ventokanto en la arbofolioj. Neniam antaŭe ŝi aŭdis ion tian, kvankam la unua bildo, kiu venas en sian menson, estas tiu de etega fluto kun malmultaj truoj, blovanta de same etega pasejo en la paŝtejo. Sed kiel fluto ludas sin mem?

Ankaŭ vi estas fluto. Vi simple ne ekiris ankoraŭ serĉe de via propra melodio.

La etulino turniĝas unue kaj removas poste la altaj herboj de la paŝtejo. La melodio transformiĝis en kanton kaj ĝiaj vortoj estas kiel sinsekvaj frapoj sur ŝia koro, tiel dolĉaj kiel tiuj de malseka flugilo de giganta birdo, kiu memorigas al ŝi, ke ŝia loko ne troviĝas surtere sed ĉiele.

Tio estas. Kanto, birdo, flugo, ĉielo. Trovu vian lokon surmonde kaj forlasu ĉion, kio balastas vin.

La etulino haltas trovinte nekonatan insekton inter la herberoj. Ĝia koloro estas malhele verda, preskaŭ kafa, kaj ĝiaj formoj svage memorigas ŝin pri reptilio, aŭ pli ĝuste pri unu el tiuj fablaj estuloj, kiuj kuŝis portretite sur tiu bela libro pri malnovaj fabeloj, kiun ŝia duonfratino ne lasis ŝin legi.

Demandas la etulino, per timida voĉo pro timo, la spuroj de malĝojo kaj la strangeco de la situacio:

— Ĉu vi estas tio, kion oni nomas drako, eta drako?

Mi estas amiko. Granda amiko, se vi volas.

La etulino etendas sian manon kun malkaŝita polmo.

— Mi volas.

La grilo suriras la knabinan manon kaj rekomencas sian kantadon. Ŝi jam ne plu komprenas ĝin, sed tio ne gravas al ŝi — ĝia muziko estas tiel bela, ke ŝiaj okuloj larmas por la unua fojo ne pro doloro, escepte se oni konsideras tiel la senson, ke tiu kokono kie oni loĝis dum la tuta vivo estas fendiganta por lasi enveni novan lumon.

La knabino observas la sitelon siaflanke, senmovan kaj mutan kiel delonge malplena ŝelo, kaj poste turnas sian rigardon al la kordono da arboj kaj la neĝkovrita montaro starantaj ĉe la horizonto. Ŝi aŭdis, ke post ĝi troviĝas la oceano, prato el sala akvo, kiun oni ne povas trinki, sed kie loĝas enormaj kaj fortikaj blankaj birdoj, kiuj kantas laŭ la lingvo de ondoj. Ĝi ŝajnas tre fora angulo, sufiĉe por ke ĝin neniam atingu la kreado kaj la brutaleco de ŝia ununura familio, sed la etulino ne pensas tiujn bildojn kiel forkuron. Subite la teruro pri la puno de ŝia duonpatrino restis tre fore, same kiel la nokto kaj ŝiaj timoj forvaporiĝas je la alveno de aŭroro, kiu disverŝas sian varman

lumon sur la teron. Dume la grilo daŭre lulkantas al ŝi de ŝia mano, kaj ĝia kanto finas kunkudri la lastajn vundojn de ŝia pasinteco.

La knabino forgesas la revenvojon al la domo, kie ŝi de ĉiam loĝis, kaj la duonpatrino, kiu elhejmiĝis serĉe de ŝi, perdiĝas en labirinto da zumadoj, kiuj ŝin malfruigas kaj konfuzas dum sufiĉa tempo. Ĉi tio neniam antaŭe okazis, sed nur la feoj povas scii tion. Kaj ne gravas, verdire; la historioj de la knabino kaj la virino fendiĝis porĉiame danke al la sonbarilo de la grilo.

— Ĉu ankaŭ mi povos kanti iam?

La grilo ridas kaj ploras samtempe. Ŝi perceptas la ŝanĝon en ĝia melodio kaj tiam ankaŭ ŝi mem ridas kaj ploras.

— Ek, etulo. Ni iru serĉi mian voĉon.

La knabino eniras en la densejon de la kamparo kun la grilo ankoraŭ surpolme, kvazaŭ ĝia senĉesa kanto estus lampo meze de mallumo aŭ la mano de tiu amiko, kiun ŝi neniam havis kaj pri kiu, tamen, neniam ĉesis revii.

Originala titolo: *Canción de grillo*

Verkis Paula Rivera Donoso (2018)

Tradukis Persikore Plum (2024)

Provlegis Aŭtunido

La aŭtorrajto de la originalo restas ĉe Paula Rivera Donoso. Rajto esperantigi estis disponigita de la aŭtoro al Persikore Plum por publikigo nur en Kiel inko por mondomo.